HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Esperanto, Internacia lingvo

La miljara abatejo Tihany, kie okazis orgenkoncerto por la ekskursantoj de la 34-a IFEF-kongreso

1
---------- 65-a jarkolekto
2021

HUNGARA FERVOJISTA MONDO
Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.
.....
Respondeca redaktoro:
István Gulyás
Eldonas:
Hungara Fervojista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapest
Rákos út 98. I/9.
Aperas kvaronjare
Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000
al eksterlanda adreso: EUR 12
*
MAGYAR VASUTAS VILÁG
A magyar eszperantista vasutasok központi lapja
Felelős szerkesztő: Gulyás István
Kiadásért felelős
A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
„Szkenguru" Nyomda Budapest
Felelős vezető: Balla László
.....
ISSN 0230-323x
.....

ENHAVTABELO:

2. I. Gulyás: **Nova Viruso**
3. I. Gulyás: **Reta ĝenerala kunsido de HFEA**
5. I. Gulyás: **Istvántelek**
7. I. Gulyás: **Memore de Ábrahám Ganz**
9. I. Gulyás: **Denove pri la medioprotektado**
10. I. Gulyás: **Historio de la HFEA (Tria parto)**
15. I. Gulyás: **Diraĵoj**
17. I. Gulyás: **Vitaminoj**
19. I. Gulyás: **Honordiplomo**

65-a jaro N-ro 1, JANUARO - MARTO

NOVA VIRUSO

En la pasintaj tagoj oni izolis novan viruson. Tiu viruso estas eksterordinare infekta, kaj kelkaj homoj povas infekti multajn milionojn da homoj. Tiu viruso ricevis specifan nomon, kiu estas „RIDETO".
Mi vidas tiun viruson sur multaj vizaĝoj. Verŝajne ili ricevis tiun viruson, ĉar iu aŭ iuj infektis ilin. Mi spertas, ke tiu viruso estas tute alia, kiel la koronviruso, kaj multaj homoj volonte ekkaptus tion. Pro tio mi deziras al ĉiuj homoj ridetan viruson. Kiam ili havas malĝojon mi deziras ĉielarkon, por ke ili anime povu promenadi en la nuboj; ridon, kiu karesu ilian lipon; kareseman ĉirkaŭprenon kiam la animo frostas; multajn verajn geamikojn, kiuj gajigas ilin; belecon por ke la okuloj vidu nur tiun; memfidon, se turmentas ilin duboj; kredon, en kies kadro la vivo estu plene valora; kuraĝon, por ke ili havu memkonon; paciencon, ke ili akceptu la mondon; amon, por ke ili povu tiun dividi kun multaj homoj.
Sed bedaŭrinde ankoraŭ ĉeestas la koronviruso, kaj ni ne rajtas trankvile ripozi kaj revadi ĝis kiam tiu misvola viruso infektas la tutan mondon. Estas eble, ke la rideto momente helpas al ni, sed tiam ni rajtas trankviliĝi, se la misvola viruso definitive malaperos el la mondo.
La esperantistoj retrovas la aplombon en tiu malfacila situacio, kaj helpe de la komputilo kaj la diversaj programoj provas daŭrigi la plej gravajn movadajn aktivecojn. Ili jam akiris rezultojn sur tiu tereno, kaj eklernis, ke la sperto estas la plej bona instruisto. Tiujn aktivecojn ni devas daŭrigi, kaj tiel certigi la kontinuan kaj senĉesan movadan laboron. Pere de la viruso „rideto", kaj la helpo de la komputilo ni eltenas en la batalo kontraŭ la koronviruso. Mi deziras al ĉiuj esperantistoj bonrezultan kaj fruktodonan aktivecon en la nova jaro.

István Gulyás

RETA ĜENERALA KUNSIDO DE HFEA

La jaro 2020 kreis eksterordinaran situacion pro la koronvirusa epidemio. Tiu situacio tuŝis preskaŭ ĉiujn kontinentojn, landojn, homojn, organizojn, eĉ organizaĵojn. Pro tio en la jaro 2020 nia asocio ne povis organizi ĝeneralan kunsidon kaj plenumi la entreprenitajn taskojn. Laŭ la koncerna registara dekreto eblas organizi virtualan ĝeneralan kunsidon kaj tiu maniere decidi pri la aktiveco kaj fari definitivajn decidojn. Laŭ tiu eksterordinara ebleco pretiĝis la raporto pri la aktiveco de nia asocio por la jaro 2019.
La raporto konstatas, ke el la nuna estraro (prezidanto: István Gulyás, sekretario: D-ro József Bacsárdi, ekonomia responsulo: D-ro József Halász) la prezidanto kaj la ekonomia responsulo anoncis la demision pro la maljuna aĝo, kaj el la nuna Kontrola Komitato (prezidanto: D-ro Imre Ferenczy, membroj: István Sutka kaj Miklós Zuberecz) la prezidanto ankaŭ demisios pro la sama kialo. Estas malbona afero, ke ĝis nun ne sukcesis novajn estraranojn, kaj membron de la Kontrola Komitato kandidatigi.
La raporto konstatas, ke nia asocio agadis laŭ nia laborplano, kiu atentas la laborplanojn de IFEF kaj UEA. Estas grava informo, ke nia asocio en 2019 havis 409 membronombrojn, el kiu estis 110 aktivaj, 76 pensiulaj kaj lernantaj kaj 223 protektantaj membroj. El la membronombroj la 3 membroasocio (Tata, Miskolc, Nyíregyháza) havas 245 membrojn. El la membraro estis 15 IFEF-membroj, 3 dumvivaj kaj 5 individuaj membroj de UEA. Bedaŭrinde la viv-aĝo de la membraro de nia asocio pli altiĝas, multaj havas diversajn malsanojn, kaj pro tio iomete rapide malkreskas la membronombro. La aliaj kialoj de la malkresko estas la ekonomia krizo en la tuta mondo, nuntempe la pandemio, la privatigo de la fervojoj, la regado de la angla lingvo kaj manko de gejunuloj.
La raporto de la estraro konigas la plej gravajn okazintaĵojn ĉe la fakgrupoj (Budapeŝto, Győr, Kelebia, Szombathely, Zalaegerszeg) kaj membroasocioj (Tata, Miskolc, Nyíregyháza). Malgraŭ la malbonaj cirkonstancoj en 2019 efektiviĝis la entreprenitaj taskoj, okazis regula klubvivo, kelkaj lingvokursoj, fakprelegoj, komunaj ekskursoj kaj aliaj programoj. Kelkajn ekspoziciojn aranĝis la fervojistaj esperantistoj pri la movada laboro kaj pri aliaj temoj, inter ili la amatoraj belartistoj de la membroasocio Tata, kiuj faris ekspoziciojn enlande kaj ankaŭ eksterlande.
La fakgrupo Kelebia sendis detalan raporton pri la interrilato de aliaj esperantistoj eĉ eksterlandanoj, pri la financa stato, pri la diversaj aranĝaĵoj kaj pri la membrovarbado. Per gravaj aktivecoj en ĉiuj jaroj ili sukcesis niveligi la membronombron kontraŭ la malgrandigaj kialoj kiel la mortoj, transloĝiĝoj, la ŝanĝiĝoj de la laborejo ktp. La fakgrupo Kelebia havas 50 membrojn (5 aktivaj, 9 pensiuloj kaj 36 protektantaj membroj). En la raporto ili mencias la murgazetojn en kelkaj stacidomoj, sur kio ili kontinue refreŝigas la Esperanto sciindaĵojn kun belaj koloraj bildoj.
La fakgrupo Győr havas 80 membrojn (7 aktivaj, 11 pensiuloj kaj 62 protektantaj membroj). Estas grava afero, ke la fakgrupo havas bonan interrilaton kun la Fervojista Kulturdomo, ĉar la fakgrupo ricevas senpage klubejon, diversajn ilojn por certigi la instrumentojn al la prezentadoj, aperadas sciigojn en la urba gazeto k.a. Kelkaj membroj de la fakgrupo instruis kaj preparis por la ekzameno la disciplojn.

La fakgrupo Budapeŝto havas nur 5 pensiulajn membrojn pro la morto de multaj agemaj membroj. Sed la membroj de la fakgrupo ludis gravan rolon en la movada laboro kaj enlande kaj internacie. La kvin membroj ordigis nian bibliotekon, pretigis la historion de la hungaraj fervojistaj esperantistoj, modifis la statuton de nia asocio, partoprenis en la IFEF-kongresoj kaj en la terminara laboro de IFEF, helpis la kulturajn aktivecojn ktp. En la kadro de tiu ĉi fakgrupo agadas nia prezidanto, kiu pretigas nian fakan revuon Hungara Fervojista Mondo (HFM), plenumas la prezidantajn taskojn, aranĝas la financajn aferojn de nia asocio ktp.
La fakgrupo Szombathely havas 24 membrojn (7 aktivaj, 17 protektantaj membroj). Pro la malbona sanstato de la gvidanto de la fakgrupo, la grupanoj ne iniciatis movadan laboron, komunan aktivecon, do la grupo preskaŭ ĉesis.
La fakgrupo Zalaegerszeg per malgranda membronombro (5 pers.) entuziasme agadas ĉefe komune kun la urbaj esperantistoj. Ili kontinue pretigis popularigajn eldonaĵojn pri Esperanto, regule helpis al la slovenaj fervojistaj esperantistoj en la movadaj laboroj k.a.
Inter la tri membroasocioj Tata havas la plej grandnombran membraron, entute 180 membrojn (63 aktivaj, 22 pensiuloj kaj lernantoj kaj 95 protektantaj membroj). La asocio regule organizas klubkunvenojn, ekspoziciojn, diversajn aranĝaĵojn kaj prezentadojn. Ili partoprenis en la konferencoj de la lingvoinstruistoj. Okazis kelkaj komunaj enlandaj ekskursoj kaj kunestadoj.
La membroasocio Nyíregyháza havas 20 membrojn (14 aktivaj kaj 6 protektantaj membroj). Ili organizis diversajn programojn por plimultigi la membrojn, sed bedaŭrinde en la lastaj kelkaj jaroj pli membroj mortis, aŭ finis la Esperanto-aktivecon. Tamen la klubkunvenoj ĉiam estas viglaj kaj utilaj por la lingvostudado.
La membroasocio Miskolc havas 52 membrojn (3 aktivaj, 27 pensiuloj kaj lernantoj, 22 protektantaj membroj). Ĉe la asocio estas praktiko, ke la prezidanto de la asocio regule sendas al la membroj de la asocio fervojajn fakartikolojn por traduki tiujn al Esperanto. La prezidanto de tiu ĉi asocio regule korektas la tekstojn de la fakrevuo HFM, eĉ multfoje li pretigis artikolojn pri la vivo de la asocio, kaj pri la fervojo.

La raporto de la HFEA enhavas la financan raporton fare de nia prezidanto. Tiu raporto taksas la buĝeton por 2019 kaj ties realigon. Ni kun malĝojo konstatis, ke en 2019 VOKE apogis nin per 100 mil Forintoj, malgraŭ la 300 mil promeso. Bedaŭrinde en 2020 nia asocio ricevis neniun apogon, pro tio multajn elspezojn (pres- kaj sendokosto per poŝto de HFM, diversaj membrokotizoj, bankaj kaj librotenadaj kostoj k.a.) ni devis pagi el propra poŝo.
Fine mi mencias, ke nia faka revuo HFM regule aperis kun 20-20 paĝoj kvaronjare ankaŭ en 2019. Tiun revuon mi dissendis perrete resp. perpoŝte al 35 landoj kaj Esperanto-organizaĵoj. Mi ricevis multajn rekonojn pro la altvaloraj artikoloj, la bonkvalitaj bildoj kaj pro la redaktada laboro.

La estraro de nia asocio ekzamenis la agadon en la 2020 jaro. La agadon neebligis la senekzempla koronvirusa pandemio. Tio praktike plene malpliigis la personajn interrilatojn kaj la organizadojn de aranĝaĵojn. Ĉar la plejparto de niaj membroj apartenas al la endanĝerigaj aĝklasoj pro la viruso, pro tio ni ne povas organizi personajn renkontiĝojn aŭ komunajn laborojn, do restis por ni la interrilatoj per telefono aŭ per aliaj elektronikaj eblecoj. Ni spertas, ke nek la fakgrupoj, nek la membroasocioj agadas sur la tereno de Esperanto. La koronvirusa epidemio ankoraŭ ne ĉesis, pro tio en 2021 kontinuas la eksterordinara stato en la tuta mondo. Kiel la fakuloj kaj la oficialaj organoj diras:”Ni priatentu niaflanke kaj unu sur la alian.”

István Gulyás

ISTVÁNTELEK

Estas bonkonata evento, ke en 1846 oni malfermis la unuan fervojlinion en Hungario inter Pest kaj Vác kaj post unu jaro la rilaton inter Pest kaj Szolnok. Al tiuj fervojlinioj konstruiĝis konservada kaj ripara stacioj en la Okcidenta Stacidomo de Budapeŝto kun la nomo „Pesti Főműhely” (Ĉefmetiejo de Pest) en la jaro 1847. Pro la rapidega evoluado de la fervojo necesiĝis pli granda kapacito el la metiejoj. Komence de la 20-a jarcento la Hungaraj Ŝtatfervojoj (MÁV) eksproprietigis la 60%-jn de la teritorio Istvántelek, kiu estas parto de la 4-a distrikto de Budapeŝto. Tie estiĝis la „Istvántelki Főműhely” (Ĉefmetiejo de Istvántelek), kies nomo estis inter 1950 kaj 1990 „Landler Jenő Járműjavító Üzem” (Vagonriparejo Jenő Landler).

La renovigita akvaturo

En Istvántelek la konstruado komenciĝis en 1902. Pro la pli facila vojaĝo de la laboristoj al la konstruado, oni estigis fervojan haltejon apud la konstruado, kies nomo estis „Palota-Újfalu”. Tiu haltejo ankoraŭ nuntempe funkcias. En la unua etapo konstruiĝis la manĝejo, centra oficejo, pordego kaj banejo. Poste komenciĝis la konstruado de la fervojreto kaj de la haloj por la vagonriparejo kaj tornmaŝinoj. Poste sekvis la efektivigo de la muntadhalo por la lokomotivoj kaj ejon por la kaldronegoj, eĉ kelkaj deponejoj. Ankoraŭ konstruiĝis tornlaborejo, forĝejo, risortejo kaj muldejo, eĉ granda metiejo por la industriaj lernantoj kaj du akvoturoj. La inaŭgura solenaĵo okazis la 1-an de majo 1905, kiam entute 1200 laboristoj laboris ĉi tie. Poste okazis la konstruado de la loĝkvartalo de MÁV kun 120 loĝejoj, kiun oni plivastigis je 252 loĝejoj.

La tombejo de la veturiloj

Dum la unua mondmilito nur pli malgrandaj damaĝoj okazis en la Ĉefmetiejo, sed la dua mondmilito okazigis plurajn gravajn damaĝojn ĉefe pere de la bombatakoj. Post la milito pro la elpremo de la vaporlokomotivoj la rolo de la vagonriparejo malpliigis, multajn laborejojn oni fermis. En la jaro 1984 finiĝis la vaportrakcio en Hungario, kaj finfine en la 31-an de decembro 1992 ĉesis la ĉefmetieja rolo de Istvántelek.

Tamen la vivo ne haltas, kaj la rolo kaj graveco de tiu teritorio ankaŭ nuntempe estas grava. La nunaj fervojistoj faras rekonitajn laborojn. Ĉi tie okazas la kvalitkontrolo de la riparado de la fervojaj veturiloj, kies aktiveco estas la plej grava pro la sekureco de la pasaĝeroj. La alia kampo estas la respondeco de la modifo de la pli malnovtipaj veturiloj. En ties kadro la plej

grava kriterio estas la disvastigo de la konstruktoj. La sekva aktiveco estas la preparado de la fervojaj veturiloj en la kadro de la plibonigo kaj la riparado. Kadre de tiu aktiveco estas la efikeco, la kontenteco de la pasaĝeroj kaj la sukceseco de MÁV.
Nuntempe en Istvántelek troveblas metiejo de „MÁV Nosztalgia Kft" kaj bontenado de kelkspecaj motortrajnoj. Estas grava rezulto, ke nun entute 220 fervojistaj laboristoj laboras ĉe la MÁV laborlokoj en Istvántelek. Estas interese, ke multaj malgrandaj nefervojaj firmaoj luas loĝterenon en la iamaj metiejoj kaj deponejoj. Ankaŭ estas interese, ke en la proksima pasinteco ĉi tie konstruiĝis 130 metroj longa vagon-lavinstalaĵo, kiu ebligas la eksteran purigadon kaj desinfektadon de la motorvagonaroj kaj pasaĝervagonoj. Malgraŭ tiuj pozitivaj rezultoj la tuta teritorio de la vagonriparejo montras malgajan bildon. La majestan pas-intecon ni nur povas imagi, sed sur la loko ni vidas kun herbaĉoj sur-kreskantajn rustajn vagonarojn, va-porlokomotivojn, pasaĝervagonojn, ruiniĝadajn halojn kaj deponejojn. Oni diras, ke tie estas la plej granda tombejo de la senutilaj fervojaj veturiloj. Tio estas malgaja vidaĵo.

La "Széchenyi István" Kulturdomo

Sur la tereno de la vagonriparejo, rekte apud la fervoja haltejo troveblas kulturdomo en moderna konstruaĵo, kies nomo estas „Széchenyi István Kulturdomo". Tiun funkciigas la Landa Kultura kaj Libertempa Asocio de Fervojistoj (VOKE). En la kulturdomo kontinue okazas diversaj programoj, kiel la ekspozicioj de la fervojistaj artistoj, filmprezentadoj, diversaj kunvenoj kaj prezentadoj, muzikaj programoj, teatraj prezentadoj, renkontiĝoj por verkisto-leganto kaj kompreneble renkontiĝoj de la fervojistaj esperantistoj. Tiu kulturdomo donis lokon por la loka Esperanto Fakgrupo ekde 1976, kiam Sándor Kovács – laboristo de la vagonriparejo – fondis tiun fakgrupon. Dekomence ĝis lia morto li estis la gvidanto de tiu fakgrupo, kaj kontinue, entuziasme li agitis pli kaj pli novajn membrojn. Per lia agito li akiris, ke ĉiu membro de la fakgrupo (57 membroj) fariĝis dumviva membro de Hungaria Esperanto-Asocio. Li estis membro de IFEF kaj UEA, eĉ fakdelegito de tiu. Li organizis ekspoziciojn pri la vivo de la vagonriparejo, kaj la agado de la lokaj esperantistoj. Bedaŭrinde li mortis en 2006, kaj poste la fakgrupo ĉesis.
Ankaŭ estas interese, ke la hungaraj fervojistaj esperantistoj (Hungara Fervojista Esperanto-Asocio) post longa ĵetiĝado ricevis lokon en la kulturdomo ne nur por la centra administrado kaj por lokoj al esperantistaj kunvenoj, sed vastan ejon por nia biblioteko. Tiun ejon ni rajtas uzi senpage.

Fine mi akcentas, ke Istvántelek donis al la fervojo signifajn inĝenierajn talentojn, fakkonojn en la servado de la fervojo. Pro tio ni devas flegi la tradicion de la vagonriparejo Istvántelek.

István Gulyás

MEMORE DE ÁBRAHÁM GANZ

Ábrahám Ganz estis unu el la kreinto de la hungara peza industrio, kies kreitaĵoj post lia morto la fabrikoj „Ganz” konatigis lin mondfama.

Li naskiĝis en svisa urbeto Unter Embrach la 6-an de februaro 1814 en multinfana familio. Li perdis sian patrinon frutempe, pro tio li devis entrepreni laboron jam en la aĝo de dekkvin jaroj. Unue li lernis metion de ĉarpentado, poste li iĝis ferofandisto. Post la lernado li estis migranta industria lernanto, en kies kadro li lernis en Züriĉ kaj poste en pluraj urboj de Germanio, Francio kaj Italio. Tie li havigis al si novajn industriajn procedojn. En 1837 li komencis labori en Vieno, de kie en 1841 li dungiĝis al la ĉefurbo de Hungario en la t.n. „Hengermalom” (Laminatila muelejo) uzino. Tie li rapide altiĝis en la rango, kaj laŭ liaj planoj oni plivastigis eĉ modernigis la uzinon. En 1842 li iĝis la estro de la uzino, kaj dume li eksperimentis novajn muldadajn metodojn. Ábrahám Ganz hardis per antimonaj manipuladoj la rapide eluziĝaj partoj de la fervojaj radoj. Per tiu metodo la daŭro de la uzebleco multoble kreskiĝis. Bedaŭrinde en 1843 li suferis gravan akcidenton dum la laboro, ĉar fluida fero elŝprucis sur lia okulo, kaj blindiĝis lia dekstra okulo. Post la akcidento li diris:”La duono de miaj okuloj elprenis, sed la muldado sukcesis”.

La bronza statuto de Ganz en Budapeŝto

En 1844 li fondis propran fermuldejon, kie komence oni produktis ferfandaĵajn kaj arkitekturajn elementojn, kaj la uzino kontinue evoluiĝis kaj plilarĝiĝis. Dum la hungara revolucio de 1848 – 1849 li subtenas la hungarajn sendependecajn klopodojn, kaj por la hungaraj milicoj li fabrikis kanonojn kaj kanonkuglojn. Post la revolucio la aŭstra milita tribunalo prirespondigis lin, sed pro lia svisa ŝtataneco la tribunalo kondamnis lin nur por kelktagaj militkaptitecoj.

En 1846 konstruiĝis en Hungario la fervojlinio Pest-Vác, kaj tiel komenciĝis la konstruoj de pluaj fervojlinioj. Pro tio la fervoja sekcio ekiĝis rapidan evoluon. Tiutempe la fervojajn veturilojn la hungaroj aĉetis el la nurenberga vagonfabriko, kiuj veturiloj pretiĝis kun usonaj gisradoj. Tiuj kunfanditaj radoj estas pli elteneblaj kaj malmolaj kiel oni fabrikis en Eŭropo. Ábrahám Ganz estis la unua fabrikisto en Eŭropo, kiu prilaboris la novan teknologion de la fervoja gisrado, kaj aplikis la gisradajn procedojn. Per tiu procedo li

anticipis la eŭropajn industriojn. Laŭ la nova fabrikado li transportis por 60 fervojkompanioj pli ol 86 mil gisradojn. La inventaĵon oni premiis kun bronzmedalo en la kadro de la pariza eĉ la londona mondekspozicioj en la jaro resp. 1862. Ankaŭ estis grava rezulto, ke lian inventaĵon oni premiis per arĝenta medalo en la svisa artindustria ekspozicio.

Trakveturilaj radoj

Intertempe la nombro de la laboristoj de lia fabriko kreskiĝis. En 1860 jam 200 laboristoj laboris en la fabriko. Ganz plimultigis la diversajn produktojn, ekzemple fervojajn nad-lorelojn por trakforkoj, ferfandaĵajn traboframojn por la pontoj kaj ceterajn fervojajn elementojn.

Li ricevis distingon „Franz Jozefo ordenon” en Vieno en 1862, kaj en 1863 oni elektis lin „Honora Membro de Buda”. Ankaŭ estis granda honoro, ke en 1865 vizitis la Ganz-fabrikon la aŭstra-hungara imperiestro I. Franz Jozefo. En la 23-an de novembro 1867 oni festis la centmil gisradon, kaj post kelkaj semajnoj – la 15-an de decembro 1867 - Ábrahám Ganz estis memmortiganto. Li estis entombigita en la Nacia Tombloko kaj Me-morĝardeno de Budapeŝto. Per la morto ni perdis unu el la pioniroj de la hungara pezindustrio.



La maŭzoleo de Ábrahám Ganz

Post la morto la gvidadon de la Ganz-fabriko daŭrigis András Mechwart. El la fabriko estiĝis unu el la plej signifaj entreprengrupo. En la originala muldejo ĝis 1964 okazis produktado, kie en 1969 oni inaŭguris la „Muldejan Muzeon”.

La homoj de la postepoko estimas la memoron de Ábrahám Ganz. Oni nomas pri li teknikan lernejon kaj trakformadan centron en Budapeŝto, faklernejon en Zalaegerszeg, statutojn pri Ganz en Budapeŝto kaj Zalaegerszeg, stratnomojn en Budapeŝto, Gödöllő, Nagytarcsa, Dunaharaszti, Dorog ktp. Oni eldonis poŝtmarkon kaj memormedalon pri Ganz. Ankaŭ estas grava novaĵo, ke en 1985 oni establis premion kun lia nomo. Tiun premion ricevas tiuj inĝenieroj kaj planistoj, kiuj akiris raciigon kaj novigon sur la tereno de la teknologia evoluigo kaj modernigo de la ferindustrio.

Nuntempe la fervojajn trakveturilajn radojn ĉe MÁV riparas la Vagonriparejo Szolnok. Ĉiujn laborfazojn oni devas fari laŭ la plej severaj normoj kaj preskriboj. La kvalitaj kondiĉoj estas ege altaj kaj gravaj, pro tio nur sendifektajn radojn oni rajtas instali en la fervojajn personvagonojn kaj lokomotivojn.

István Gulyás

DENOVE PRI LA MEDIOPROTEKTADO

En la 4/2020 numero de nia faka revuo HFM, mi verkis artikolon kun la titolo: „Defendo de la klimato”. En tiu artikolo mi ekzamenis la defendon flanke de la trafiko, medioprotektada strategio kaj de la eliganto de la karbona dioksido.
En ĉi tiu artikolo mi provas mallonge ekzameni la defendon flanke de la homoj. Mi legis ie diron de indiana tribo ĉefo: „Ni ne heredis la Teron de niaj gepatroj, sed ni pruntepreni tion de niaj genepoj”. Venas al la konkludo, laŭ tio la nuna generacio devas decidi tiel, ke atentas la intereson de la sekvaj generacioj. Ni devas antaŭzorgi, ke la estontaj generacioj povu naskiĝi al efika vivmedio. Por akiri konvenan vivmanieron estas ege grava afero eduki la infanojn ekde iliaj neplenaĝoj. Kiuj edukas tiel, por ili estas memkomprenebla tiu konduto. La plenkreskuloj malfacile povas ŝanĝi siajn kutimojn. La negativajn efikojn ni ne sentas ĉiam kiel malbonaĵoj, ĉar ni pensas, ke la problemoj ne okazas kun ni, sed en Afriko aŭ Azio kaj ne ĉe ni. Do ni devas akcepti la sendubajn kaj nenegeblajn faktojn, ke unu el la plej gravaj kaj urĝataj taskoj estas la defendo de la medio, la solvo de la klimatkrizo. Ni devas stari per ambaŭ piedoj sur la tero, kaj radike ŝanĝi la negativajn starpunktojn. Sur la tereno de la klimatŝanĝo kaj la medioprotektado ankoraŭ ni bezonas multajn taskojn. Rilate al la ŝparado ni devas ĉesigi la malŝparon, ekzemple la ŝaltilon devus dekroĉi, se ni forlasas la ejon, aŭ same la hejtadon devas detordi al pli malgranda grado, kaj la varmon ne devus ellasi tra la fenestroj, aŭ helpe de la komputiloj devas malmultigi la uzadon de la paperoj, aŭ la uzado de la privata aŭtomobiloj nur tiam estas ekonomia, se ne nur unu aŭ du personoj uzas tion, do ni devas uzi la kommunajn trafikilojn ktp. Do kelkaj ekzemploj pri la ŝparado, kion ni ne devus malatenti, nek en la familia rondo, nek en la oficejo kaj en aliaj lokoj.
La alia problemo estas la mediomalpurigado. En Hungario mi spertas, ke apud la vojoj troveblas diversaj balaaĵoj eĉ rubaĵoj, kaj same troveblas rubejoj en la arbaroj kaj aliaj malproksimaj lokoj, sed la plej grandaj problemoj estas la malpuraĵoj de la riveroj, riveretoj, lagoj kaj lagetoj, eĉ ĉe la maro. Dank’ al Dio, ke ĉe ni komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj malpuraĵkolekta movado, en kies kadro la lernantoj, homoj de diversaj societoj eĉ laboristoj kolektas la malpuraĵojn kaj forportas al la malpuraĵdeponejoj. Sed tiu metodo ne solvas ĉiun problemon, kaj estus devinta ŝanĝi la pensmanieron. Ankoraŭ mi povas vicigi la diversajn temojn sur la tereno de la klimatŝanĝo kaj medioprotektado, sed ekzemple mi nur mencias la fervojan kaj publikvojan trafikon. Estus bona afero, se la ĉefoj de la entreprenoj agnoskite la efikon de la klimatŝanĝo, kaj ili transirus el la publikvoja transporto al la fervoja ekspedo. Sed bedaŭrinde ne ekzistas tiu transportisto, kiu ekspedigas varojn per fervojo, ĉar ĝi estas medioindulga trafikbranĉo, sed pro tio, ĉar la fervoja kosto estas iomete malalta.
Estas fakto, ke la plej granda problemo troviĝas la manko de la sufiĉa kaj aŭtentika informado, per kiu la homoj povas juĝi la situaciojn de la medioprotektado, Pro tio okazas, ke la homoj tro malfrue rekonas la gravecon de la problemoj. Ni devas alimaniere pensadi pri tio, kaj al tio helpas la ekstera kaj interna medioj, eĉ la natura kaj politika medioj. Pro tio mi rekomendas al ĉiuj esperantistoj, ĉefe al la fervojistaj esperantistoj, ke ne hontu pro la malrapida ŝanĝo, sed ni kun duobla fervoro faru ageman propagandon por modifi niajn pensmanierojn.

István Gulyás

HISTORIO DE LA HUNGARA FERVOJISTA ESPERANTO – MOVADO

(TRIA PARTO)

En la pasinta numero de nia fakrevuo Hungara Fervojista Mondo mi skribis pri la periodo inter 1962 kaj 1982 de la „Historio de la Hungara Fervojista Esperanto-Movado”. Nun mi daŭrigas tiun periodon.

D-ro István Bácskai

Daŭrigo de la periodo 1962 – 1982

Intertempe kreskis la nombroj de la fakgrupoj, kaj ties membronombroj. La novaj fakgrupoj estis:

- Fervojstacio Győr (sub gvido de D-ro Imre Ferenczy, 1963);
- Fervojstacio Dunaújváros (István Rabusán, 1963);
- Fervojstacio Székesfehérvár (György Kutsera, 1963);
- Fervojstacio Zalaegerszeg (Ferenc Kapcsándi, 1963);
- Fervojstacio Tata (Károlyné Ködmön, 1964);

D-ro Imre Pethes

- Fervojstacio Kiskunhalas (János Ónódi, 1965);
- Fervojstacio Gárdony (Vilmos Budavári, 1966);
- „Vörösmarty” Fervojista Esperanto Grupo Miskolc (István Temesi, 1969);
- Fervojstacio Pécs (Lajos Ákos, 1973);
- Vagonriparejo Landler Budapest (Sándor Kovács, 1976);
- Fervojdirekcio Szombathely (Borbála Fülöp, 1977);
- Fervojstacio Budapest-Nyugati (Tibor Andorko, 1979).

Tiel en la periodo 1963-1979 entute 12 fervojistajn fakgrupojn oni fondis kun pli ol 500 membroj.

En la ĝenerala kunveno de la hungaraj fervojistaj esperantistoj en 1981 okazis estrarelekto por la sekvaj kvar jaroj. La funkciuloj estis: prezidanto D-ro István Bácskai, vicprezidantoj D-ro Imre Pethes kaj Inĝ. István Gulyás, sekretario János Patay (1929-2015), ekonomia respondeculo János Katona, kasisto László Zseni (1913-2004), kaskontrolisto József Halász.

En la fino de tiu ĉi periodo (1982) ni faris membrorevizion, kaj konstatis, ke el la 37 fakgrupoj funkcias 18 entute kun 1002 membroj. El tiuj estis 202 IFEF-membroj, 291 gejunuloj. Tiuj fakgrupoj estas la jenaj:

• Centra Fakgrupo Budapest	119 membroj,	51 IFEF membroj
• Fervojdirekcio Budapest	67 „	20 „
• Fervojdirekcio Debrecen	131 „	21 „

• Vagonriparejo Dunakeszi	27	„	3	„
• Fervojstacio Győr	19	„	6	„
• Fervojstacio Hódmezőv.	38	„	3	„
• Fervojstacio Kecskemét	55	„	6	„
• Fervojstacio Kiskunhalas	65	„	14	„
Vagonriparejo Landler Budapest	57	„	8	„
• „Vörösmarty” Grupo Miskolc	43	„	9	„
• Vagonriparejo Miskolc	15	„	3	„
• Fervojstacio Nyíregyháza	44	„	5	„
• Fervojstacio Pécs	144	„	36	„
• Fervojdirekcio Szeged	11	„	4	„
• Fervojstacio Székesfehérvár	24	„	4	„
• Fervojstacio Szolnok	29	„	3	„
• Fervojstacio Tata	101	„	1	„
• Fervojstacio Zalaegerszeg	13	„	5	„
Entute:	1002 membroj,		202 IFEF membroj.	

Se ni ekzamenas la membronombrojn de la hungaraj fervojistaj esperantistoj laŭ la vivjaroj en 1982, ni ricevas interesajn bildojn:

- sub la 30 vivjaro 291 membroj,
- inter 31-40 vivjaro 158 membroj,
- inter 41-50 vivjaro 192 membroj,
- inter 51-60 vivjaro 186 membroj,
- inter 61-70 vivjaro 104 membroj,
- super la 71 vivjaro 71 membroj.

Tiuj indikoj montras, ke en la okdekaj jaroj la hungara fervojista esperantistaro estis iomete junaj aŭ mezaĝaj.

Inĝ. István Gulyás

La Centra Fakgrupo de la fervojistaj esperantistoj agadis kune kun la Hungara Esperanto-Asocio (HEA) sub la nomo „Fervojista Fako de HEA”. Pro tio kelkaj fervojistaj esperantistoj ageme partoprenis en la estraro de HEA, en la organizado de diversaj konferencoj kaj aliaj okazintaĵoj, kaj helpis efektivigi la entreprenitajn taskojn. Por akceli la movadan laboron kaj plialtigi la rezultojn dise en la lando, la estraro de la Fervojista Fako de HEA kunlabore kun la Fervojista Sindikato, ekde jaro 1969 dum multaj jaroj aranĝis t.n. pliperfektigan kurson por aktivuloj de Esperanto-grupoj, eĉ ne nur por fervojistoj, sed ankaŭ tiuj de nefervojistaj grupoj.Tiuj okazis en fervojaj ĉebalatonaj ripozejoj de Zánka, Balatonkenese, krome en loko Gárdony ĉe la lago Velence, kaj daŭris unu semajnon. Ĝiaj temoj estis: movadaj labormetodoj, movadhistorio, pliperfektigo en lingvoscio, plipreciziĝi la movad-financajn farendaĵojn, interŝanĝi la labormetodojn. En ĉiu temo prelegis eminentaj fakaj gvidantoj de la landa movado, kion ĉiam sekvis konsultado.

En la kadro de la terminara laboro de IFEF ankaŭ la hungaroj partoprenis. En la jaro 1968 jam sukcesas eldoni la poŝforman fervojan terminareton kun konciza gramatiko en variantoj Hungara – Esperanto kaj Esperanto – Hungara en mil ekzempleroj, kiujn redaktis D-ro István Bácskai. La hungara terminara grupo dekomence partoprenis ankaŭ la internacian terminaran laboron de IFEF por traduki kaj kompletigi la seslingvan UIC-leksikonon. Cetere tiu laboro seninterrompe daŭras, nuntempe jam ĝi estas pli ol dudek lingvoj – inter ili ankaŭ en Esperanto – kaj aperadas laŭ la sistemo per disko CD-ROM. Ĉi tie mi rimarkas, ke la dua eldono de „RailLexic CD-ROM pri Fervoja Terminaro en Esperanto" estis tradukita al Esperanto/13 naciaj lingvoj kaj inverse, kaj pere de nia prezidanto Inĝ. István Gulyás MÁV eldonis ĝian libroforman varianton.

D-ro István Bácskai kaj la IFEF-prezidanto J. Giessner

János Patay

Nian rezultohavan kunlaboron kun IFEF pruvis la elekto en la kadro de la 21-a IFEF-kongreso en 1969 okazinta en Avignon, kaj la reelekto en la 26-a kongreso en 1974 en Tarragona de D-ro István Bácskai kiel komitatano „A" de IFEF ĉe UEA. En tiu funkcio D-ro Ferenc Phersy sekvis lin en 1976, sed pro lia grava malsano ekde 1980 Inĝ István Gulyás transprenis tiun gravan taskon, kaj li plenumis tiun respondplenan kaj honorigan postenon ĝis la jaro 2010.

La hungaraj fervojistaj esperantistoj preskaŭ ĉiujare organizis t.n. „Landan Fervojistan Esperanto-Amikan Renkontiĝon" kun altnivelaj kulturaj programoj, ekskursoj kaj fakaj konferencoj. Intertempe ankaŭ nefervojistoj, eĉ kelkaj eksterlandanoj partoprenis ĝin kun familianoj. La nombro de la partoprenantoj varias inter 50-100. Komence ĉiujare okazis ĝenerala kunsido, kiam la estraro raportis al la delegitoj de la fakgrupoj pri la faritaj laboroj, rezultoj, movadaj kaj financaj problemoj, buĝetoj, laborplanoj k.a. Estis grava tasko, ke la laborplano harmoniu kun tiuj de HEA, IFEF kaj UEA. La kunsidoj difinis la taskojn por la sekvaj jaroj, fiksis la limdatojn kaj la respondeculojn. Bedaŭrinde la interrilato kun la estraro de la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj (MÁV) preskaŭ ĉesis, sed la fervojista Sindikato kaj la direktoroj

Szilárd Bálint

Simon Csóra

de la provincaj fervojdirekcioj, eĉ kelkaj staciestroj helpis nian agadon. Unu post alia ŝanĝis la membroj de la estraro de MÁV, precipe la ĝeneraldirektoro. Pro tio la financa apogo de nia asocio okazis nur malpliiĝe. Tamen la hungaraj fervojistaj esperantistoj entuziasme kaj efike agadis, kaj akiris landan kaj internacian reputacion. Vidante la forton de nia organizaĵo kaj movado en la 1980-jara ĝenerala kunsido la delegitoj proponis inviti la IFEF-kongreson al Hungario en la jaro 1982. La jam menciitaj fervojistaj fakgrupoj agadis bonrezulte, kaj similan laborprodukton prezentis la fakgrupoj de la Vagonriparejoj de MÁV. Elstaran laboron plenumis la Fakgrupo de la Vagonriparejo Dunakeszi helpe de la gvidanto de Lajos Kapitány. En la kadro de tiu ĉi fakgrupo ekzistis „Vira Koruso", kiu eklernis esperantajn kantojn por sukcese roli en la 14-a IFEF-kongreso en Budapeŝto. La fakgrupo de Vagonriparejo Miskolc sub la gvido de István Pál grave akiris rezulton sur la tereno de la Esperanto-kursoj, kaj ili eldonis lokan Esperanto-ĵurnalon, kaj organizis landajn eĉ eksterlandajn ekskursojn por la familioj de la fakgrupo. La Fakgrupo de la Vagonriparejo Székesfehérvár, sub la gvido de György Kutsera faris ankaŭ Esperanto-kursojn, kie partoprenis multaj laboristoj en la Vagonriparejo. Ili akiris grandan sukceson, kiam iniciatis nomumi urban placon esperante en la kadro de la Landa Amika Renkontiĝo en Székesfehérvár en jaro 1972. La urba magistrato konsentis tiun proponon, kaj solene inaŭguris tiun placon el la nomo „Esperanto placo". Ekzemplodone partoprenis en la Esperanto aranĝaĵoj la membroj de la Fakgrupo Landler Vagonriparejo Budapeŝto, kaj grave helpis ili la preparon de tiuj. La gvidanto estis Sándor Kovács, kiu kun sia edzino senlace kolpodis organizi ekspoziciojn pri la vivo de la vagonriparejo, kaj la agado de la lokaj esperantistoj. Helpi al la financa stato de la Hungara Esperanto-Asocio, ĉiuj membroj de la fakgrupo enpagis la kotizon por dumviva membreco. La membroj de la Fakgrupo de la Vagonriparejo Szolnok ludis gravan rolon en la Esperanta vivo de la urbo. Ankaŭ la Vagonriparejo Északi en Budapeŝto havis fakgrupon ĝis iomete mallonga tempo, ĉar la membroj de la fakgrupo aliĝis al la budapeŝtaj fakgrupoj de la fervojistoj.

Pál Kristek

Periodo 1982 – 2000

La jaro 1982 estis granda kaj grava mejloŝtono de la hungara fervojista Esperanto-movada historio, ĉar post dudek jaroj de la bonsukcesa 14-a IFEF-kongreso, la hungaraj fervojistaj esperantistoj ricevis honoran taskon organizi IFEF-kongreson en Hungario. La LKK konsistis el la sekvaj fervojistaj esperantistoj: prezidanto Inĝ. István Gulyás, sekretario János Patay, kasisto Imre Domokos, membroj Ferenc Phersy, D-ro István Keresztes kaj László Zseni. Larĝskale tre

preciza dujara preparlaboro anticipis la kongreson. LKK aranĝis intensajn lingvokursojn por la helpantoj kaj kunlaborantoj por klerigi ilin je perfekta lingvoscio, perfekte labori sur ĉiu tereno de la kongreso. Tiutempe pr. 40 organizantoj, kunlaborantoj, helpantoj faris kun granda sukceso supergradan ŝtatan ekzamenon pri Esperanto,kompletigitan kun fervoja fako.

La 34-a IFEF-kongreso okazis inter la 2-a kaj la 8-a de majo en la ĉebalatona fama kuracloko Balatonfüred. La kongreso rezidis en la plej moderna kaj belega Instrua Centro de la Landa Konsilantaro de Sindikatoj. Speciala honoro estis por la kongreso, ke la konstruaĵo mem komencis funkcii per la aranĝo de tiu ĉi kongreso. La estraranoj de IFEF kaj honoraj membroj kun familianoj jam pli frue alvenis, ĉar la estraro de la Sindikato invitis ilin al la ĉeftribuno de Budapeŝto spektakli la majan marŝon de hungaroj. Post la parado la honorigitaj gastoj per aparta buso vojaĝis al la kongresurbo. La estraranoj kaj komitatanoj de IFEF kaj la plej rezulte laborantaj eksterlandaj movadanoj ricevis senpagan fervojbileton de MÁV. La aliaj kongresanoj veturis al Balatonfüred per speciala trajno, konsistanta el elegantaj unuaklasaj vagonoj, respektive per specialaj aŭtobusoj inter la stacidomo kaj la kongresejo. La kongresanoj sen tumulto tre rapide povis okupi la hotelĉambrojn, rezulte de la lerta organizo de LKK, malgraŭ tio, ke la nombro de la partoprenantoj estis 605 el 23 landoj. Mi mencias, ke LKK enkondukis specialan iniciaton, ke propagandcele unu junulo – sub 30 jaroj – el ĉiu lando, kie IFEF havas landan asocion, senpage rajtas partopreni la tutan kongreson – inkluzive tranoktadon, provizadon, ekskursojn, k.a. – por allogi gejunulojn al la movado. Bedaŭrinde nur kelkaj junuloj pretendis tiun eblecon. La 110-paĝa kongreslibro detale informis pri ĉiuj sciindaĵoj, programeroj. La kulturprogramoj, orgenkoncerto en miljara abatejo Tihany, la ekskurso al la norda parto de la lago Balatono donis neforgeseblajn travivaĵojn al la partoprenantoj. La kompleta urba galerio estis je la dispono de la kongreso por prezenti la historion, literaturon, la ĉiurilatan movadon de Esperanto ne nur al la kongresanoj, ankaŭ al la publiko.

Kunsido de la Faka Komisiono dum la kongreso

La ĉefan fakprelegon prezentis Inĝ, István Gulyás kun la titolo „La estonto de la eŭropaj fervojoj, kaj ene la rolo de la Hungaraj Ŝtatfervojoj”. Tiu prezentado rikoltis grandan sukceson. La programoj de la kongreso okazis laŭplane, ĉio estis bone araĝita. Dum la kongreso D-ro Erwin Semmelrath, reprezentanto de FISAIC (Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots – Internacia Fervojista Federacio por Kulturo kaj Libertempo) transdonis la plej altan distingon de FISAIC al D-ro István Bácskai. En la solena fermo de la kongreso la prezidanto de IFEF akcentis, ke la kongreso meritis la titolon: ”Kongreso de bonkoreco”.

(Daŭrigota) **István Gulyás**

DIRAĴOJ

En la pasintaj numeroj de HFM mi prezentis multajn aforismojn, kaj nun mi publikigas kelkajn diraĵojn, kiujn ĉefe en Hungario uzas la homoj. Estas interesaj la infandiraĵoj, ĉar tiuj montras, ke la infanoj kiamaniere pensadas pri la ĉiutaga vivo. Jen diversaj diraĵoj elektitaj de mi:

- La maljuneco havas du gravajn simptomojn: la unua estas la memorperdo, la alian mi forgesis;
- La plej altruistaj homoj estas tiuj, kiuj distribuas la menson, ĉar ili donas el tiu, kiun ili ne havas;
- Tiu tago kiu forpasas sen rido, tio estas perdita tempo;
- En la flamo de la ŝato devas fandiĝi la plej malmola fero;
- Ĉiam tiu homo estas la pli fortanima, kiu ne furiozas sed ridetas;
- La tirfermilon eltrovas svisa viro, kaj poste la jodlon, kiam li tiras sian tirfermilon;
- La mankon de la amo ne povas kompletigi la homo, sed la amo kompletigas ĉion;
- Kiu fosas sub alia, falos mem en la foson;
- Bandito fariĝas plej bona gardisto;
- La florojn kreskigas la sunradio, la homan animon kreskigas la amo;
- La magia kuracado de la animo estas la bona vorto;
- La plej bona metodo por gajigi vin mem, se vi gajigas iun alian;
- La plej bela donaco estas tio, kion vi povas doni al iu: vian tempon, vian atenton kaj vian amon;
- Ne estas sufiĉa sopiri al la bonaĵon, sed tion devas voli, kaj ne estas sufiĉa nur voli, sed devas fari;
- Ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam;
- La celo sanktigas la rimedojn;
- Ĉiu miraklo daŭras nur tri tagojn;
- Estu tiel plenkreskulo, kiun vi bezonis kiel infano;
- Bona pastro lernas ĝismorte kaj ankaŭ la pastro ne rekomencas sian predikon;
- Ne ekzistas rozo sen dorno kaj festeno sen ĉagreno;
- De legado sen atento ne riĉiĝas la prudento;
- Homo proponas, Dio disponas;
- Malgrandaj infanoj kaŭzas laboron, la grandaj doloron;
- Gajnita veturkoste, perdita limimposte;
- La vojo al la infero estas pavimita per bonaj intencoj;
- Pli facile estas multon elspezi, ol malmulton enspezi;
- Vi iĝas plenkreskulo tiam, se pri via sorto ne akuzas viajn cirkonstancojn, sed vin mem;
- La homoj ne estas mallibero de siaj sortoj, sed nur siaj mensoj;
- De guto post guto disfalas granito;
- Malsaĝulo malpaciĝas, dek saĝulo pacigi ne sufiĉas;
- Konfidi brasikon al gardo de kapro;
- Sen ordo en afero ne ekzistas prospero;

- Satigi la kaprinon kaj konservi la brasikon;
- Kiu kaptas glavon, tiu pereos per glavo;
- Kiu licas al Jovo, ne licas al bovo;
- Kiu avidas pli bonan, perdas plej bezonan;
- Kiom da homoj, tiom da gustoj;
- Ne juĝu, tiam vi ne estos juĝata;
- Mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra;
- Necesas kiel pano ĉiutage;
- Kion ni ne scias, tion ni ne envias;
- La rideto estas tiu kurbiĝo, kiu faras ĉion en korekteco, pro tio vi ĉiam ridetu, por ke vi ne bezonu korektadon;
- Disputoj kondukas al malpaco;
- Ebria kaj fola estas verparola;
- Kiu mensogas per unu vorto, ne trovas kredon ĝis la morto.

INFANDIRAĴOJ

Nun sekvas la infandiraĵoj, kiuj estas interesaj, eble komikaj kaj vere korfavoraj eĉ senkulpaj. Mi kun granda plezuro elektis el multaj diraĵoj, kiujn parte miaj genepoj diris antaŭ dudek jaroj, kaj parte mi aŭdis de la najbaraj infanoj. Jen:

- La duoninsulo estas tiu insulo, kiun oni ankoraŭ ne finis komplete;
- Ju pli la homoj maljuniĝas, des pli iliaj dentoj estas altvaloraj;
- Kiam mia avino havas dentdolorojn, ŝi metas tiujn en glaso;
- En la ventrego de mia patrino estas bebo, sed mi tute ne scias kia maniere ŝi glutis ĝin;
- La plej utila besto estas la porko, ĉar ĉiu parto de ĝi eblas utiligeblaj: el la antaŭa kaj malantaŭa parto de ĝi estas viando, el ĝia haŭto estas ŝuo, el ĝia hararo estas broso kaj per ĝia nomo oni povas blasfemi;
- Mi estis iam tiel malsana, ke mi havis 40 kilogramojn da febro;
- Mi jam ne havas avinon, ĉar ni plantis ŝin en la tombejo;
- La kuracistoj diras, ke la mortaj malsanoj estas la plej malbonaj;
- En la zoologia ĝardeno oni povas vidi tiajn bestojn, kiuj ne ekzistas;
- Mi ne scias kiom da aĝoj mi havas, ĉar tio konstante ŝanĝiĝas;
- La alimento estas la salajro de la infanoj, se la patro transloĝiĝas el la hejmo;
- Ĉiuj fiŝoj produktas frajon, la rusoj ankaŭ kaviaron;
- Ĉe ni la viroj rajtas edziĝi nur kun unu virino, tion oni nomas monotonio;
- La humanismo estas tiel kiel la vegetarismo, sed nur la humanisto manĝas homojn;
- La infano diris al la patrino, ke nun ni ne aĉetu ludilojn, pli volonte ni petu al kristnasko, ĉar tiam tio estas senpage;
- Mia avino transloĝiĝis al la transmondo, pro tio ankaŭ mi havas iun eksterlande;
- Mia avino estas dika pro tio, ĉar ŝi havas multajn amojn;
- Mia patrino diris, ke la infana inklino restas ĝis la morto, pro tio mi estu obeema infano ĝis ŝia morto.

István Gulyás

V I T A M I N O J

En Hungario multspecaj aŭtunaj fruktoj kreskas, kiuj estas delikataj kaj sanaj, per kiuj la homoj povas pli facile havigi al la gravaj vitaminoj. En la malbona tempoperiodo, kiun ni nun travivas, ni devas uzi maskon, estas deviga teni la du metrajn distancojn unu de aliaj homoj, observi la higienajn normojn, krome ni devas atenti pri la imunfortigo. Al tio helpas al ni la aŭtunaj fruktoj (diversaj pomacoj, vinberoj, persikoj, piroj, nuksoj ktp), kiuj troveblas en nia lando, eĉ multaj sudaj fruktoj (citronoj, oranĝoj, mandarinoj, bananoj, avokadoj ktp), kiujn ni facile povas aĉeti en ĉiuj foirejoj, magazenoj kaj aliaj vendejoj.

Ĉiuj fruktoj helpas al ni konservi la sanon kontraŭ la koronviruso. Multspecaj vitaminoj ekzistas, kiuj helpas venki la malsanojn. La vitamino estas tia organika komponaĵo, kiu estas necesa por la homa organismo. Bedaŭrinde la homa organismo ne povas aŭ nur parte povas produkti la bezonatajn kvantojn el la vitaminoj, pro tio ni devas certigi nutrajn suplementojn. Ekzemple la homa organismo ne povas produkti la vitaminon „C”, aŭ produkti la vitaminon „D” oni bezonas sunbrilon, kiu ekzemple vintre ne estas ĉiam disponebla. Pro la fizikaj laboroj, la longaj kaj intensaj movoj kaj sportoj kreskas la vitaminbezono. Estas sama kriterio pro la konfliktaj vivmanieroj, fumado kaj plifortiga alkoholkonsumado eĉ la senorda manĝado.

La vitaminoj havas du ĉefajn kategoriojn: en graso solveblaj vitaminoj („A”, „D”, „E”, „F” kaj „K”), kaj en akvo solveblaj vitaminoj („B_1-B_{12}”, „C” kaj „H”). En la akvo solveblajn vitaminojn la organismo ne kapablas rezervi, pro tio ĝi bezonas kontinuan kaj tagan rekompletigon. Okaze de la koronviruso la fakuloj akcentas la gravecon de la „C” kaj „D” vitaminoj. Pro tio mi konigas tiujn du vitaminojn rilate al la aŭtunaj fruktoj kaj aliaj terproduktoj.

La vitamino „C”

Multaj homoj tenas sian opinion, laŭ tio la vitamino „C” estas universala medikamento pro la efiko de la imunfortigo. La vitamino „C”, nome „askorbata acido” estas unuakvalita kaj bona antioksidantefika kombinaĵo. Tio signifas, ke ĝi

helpas malakceli eĉ haltigi la ĉelnivelajn damaĝojn. Unu el la plej gravaj karakteroj de la vitamino „C” estas la kunligo de la liberaj radikoj, kies plimultiĝoj kondukas al la malsano. Estas interese, ke la produktado de la vitaminon „C” multspecaj mambestoj kapablas produkti, sed ekzemple la organismo de la homo, simio, kobajo, vesperto kaj kelkspecaj fiŝoj ne povas produkti tion. Pro tio tiuj bestoj kaj la homoj devas anstataŭigi tiun vitaminon, kaj devas enigi ĝin al la besta kaj homa organismo pere de la nutraĵoj. Potage ni devas manĝi tiajn manĝaĵojn – inter tiuj la fruktojn – kiuj certigas la sukcesajn kvantojn el la vitamino „C”. Bedaŭrinde la homa organismo ne kapablas rezervi ĝin, sed ĝi tuj utiligas tion. Pro tio ni devas manĝi multajn fruktojn, citrusojn, rozberon, paprikon, acidan brasikon kaj diversajn menukompletigajn produktaĵojn. La opiniojn pri la necesa kvanto por la homa organismo dividiĝas inter la okdek kaj plurmil miligramoj. La kvantoj dependas ankaŭ de la vivcirkonstancoj kaj la sanstato de la uzanto.
Ni hungaroj estas fieraj, ĉar la hungara biokemiisto Albert Szent-Györgyi izolis en la jaro 1930 la vitaminon „C”, pro tio li ricevis en 1937 „Medicinan kaj Fiziologian Nobel-premion”. Li konsumis ĉiutage mil miligramojn da vitamino „C”, kaj li vivis ĝis 93 jaraĝoj, kaj ĝis malfrua jaraĝo li restis aktiva, freŝa kaj spirite kaj fizike.

La vitamino „D”

Ĉi tiu vitamino estas la plej aktiva kombinaĵo de nia organismo, kaj ĉiuj homaj organoj bezonas tion, kaj estas nemalhavebla vitamino. La manko de tiu ĉi vitamino pliigas la riskon de preskaŭ ĉiuj malsanoj, inter aliaj la tumoron, korinfarkton, altan sangopremon, cerban hemoragion, diabeton ktp. Ne estas hazardo, ke oni nomas ĝin „sunbrila vitamino”. Estas konata, ke la vitamino „D” produktiĝas en la haŭto al la efiko de la sunbrilo, sed ankaŭ per sanaj nutriĝadoj ni devas certigi la nivelon de la vitamino „D” en nia organismo. Inter aprilo kaj oktobro la sunbrilo tuŝas nian vizaĝon kaj nekovritajn ekstremaĵojn, sed vane ni sunumas, ĝis certa nivelo ne formiĝas pliaj vitaminoj „D”. Tiu vitamino estas la respondeca por la konservo kaj sano de niaj ostoj, ĉar la plej grava tasko de ĝi estas prikonstrui la kalcion en la ostoj kaj dentoj. Helpe de la vitamino „D” la nervaro de la homoj konvene funkcias, pliigas la kapablecon de la koncentriteco.

La foirejo en Budapeŝto

La aŭtuna sezono kreskas tiujn fruktojn, per kiuj konsumadoj por niaj organismoj havigas gravajn vitaminojn. Ni ne forgesu pri la fruktoj kaj aliaj produktaĵoj, kiuj troveblas printempe kaj somere en multaj landoj, kompreneble ankaŭ en Hungario. Ankaŭ tiuj certigas ankoraŭ plurspecajn kaj sufiĉajn vitaminojn por la homa organismo kaj helpas al ni batali kontraŭ la diversaj malsanoj. Mi proponas por aĉeti fruktojn kaj aliaj produktaĵojn, kaj anstataŭ multaj viandoj ni manĝu sanajn kaj delikatajn fruktojn, por ke ni per tiuj fruktoj kaj aliaj produktaĵoj fortigu nian organismon.

István Gulyás

HONORDIPLOMO

Antaŭ kelkaj tagoj mi estis surprizita, kiam la poŝtisto kunportis kaj transdonis al mi grandkovertan leteron, en ĝi mian „Honordiplomon”. Tiun diplomon aparte ricevis 11 hungaraj esperantistoj de la prezidantaro de la Hungaria Esperanto-Asocio. La kialo de la aljuĝo estis, ke tiuj hungaraj esperantistoj dum la jardekoj kontinue laboras por Esperanto. Tiuj esperantistoj estas la sekvaj:

- D-ino Julianna Farkas
- D-ro Lajos Molnár
- D-ro Gábor Márkus

Ili ricevis „Zamenhof” memordiplomon. La aliaj ricevis „Pro Esperanto” memordiplomon pro ilia longjara sukcesa kaj fidela poresperanta agado. Inter ili estas kvar fervojistaj esperantistoj, kio montras, ke la fervojistaj esperantistoj efike agadas, eĉ ne nur sur la tereno de la fervojista Esperanto-movado. Ili estas la sekvaj:

- S-ro József Horváth
- S-ro István Gulyás
- D-ro József Halász
- S-ino Károlyné Ködmön

Ankoraŭ ricevis „Pro Esperanto” memordiplomon:

- S-ino Lászlóné Pásztor
- S-ino Edit Lindwurm
- S-ino Katalin Faragó
- S-ino Gyöngyi Mézes

Tiuj distingoj estas granda honoro por ni ĉiuj, kaj ni ege dankas tiujn. Ni dankas la subskribantojn de la honordiplomo, kiuj taksis niajn laborojn kaj juĝis tiun diplomon. Bedaŭrinde pro la koronvirusa epidemio propra-persone ili ne povis transdoni la diplomon, pro tio ili sendis gratulleteron al ĉiuj distingitoj. La subskribantoj estas Profesoro D-ro György Nanovfszky honora prezidanto de HEA, Mária Erzsébet Eszes prezidanto de HEA kaj János Nagy vicprezidanto de HEA (afergvidanto).

István Gulyás



La 220 seria vaporlokomotivo en la Fervojhistoria Parko en Budapeŝto

Transponta Esperanto-Kongreso
germana - pola - fervojista

TRAKO

Frankfurt (O) / Słubice
21-a ĝis la 28-a de Majo 2021

La 72-a kongreso de IFEF – pro la pandemio - verŝajne okazos en la ŝanĝita tempo - (21. 05 – 24. 05 2021) - kiel „Hibrida Kongreso" en miksitaj lokaj/retaj diskutrondoj